Al la amikoj!

La eldono de detala raporto pri la oficialaj paroladoj, diskutadoj kaj decidoj de l'Bulonja kongreso estas certe la plej valora memoraĵo por ĉiuj Esperantistoj, ĉar ĝi montras la gloran venkon, la sukcesan ekzamenon de nia lingvo.

La verkisto uzis la alfaron de l'sistemo Stolze-Schrey al la helpa lingvo por fiksi la parolojn de l'reprezentantoj de la plej diversaj popoloj, konvenintaj al la kongreso, kaj prezentas nun la tradukon de siaj stenografiaj notoj por provi al la publiko, ke la esperantistoj de la tuta landaro facile interkompreniĝis kaj diskutadis per la lingvo Esperanto.

Legante la raporton la kongresanoj duafoje travivos la impresplenajn horojn de Bulonjo-sur-Maro, kaj la nekongresanoj ricevos la plej klaran bildon de la gravaj momentoj en kiuj la „nova sento" vere ekformiĝis en la mondo.

Donacante la verketon al la tutmonda samideanaro, la aŭtoro diras koran dankon al ĉiuj amikoj, kiuj per sendo de resumoj aŭ de bonaj konsiloj faciligis la plenumon de l'entreprenita tasko, kaj li esperas, ke la laboro farita inter la plej vivaj impresoj de la neforgesebla kongreso, ne estu senutila por la ĉiama progresado de nia mirinda lingvo.

Laŭfon (Svisujo), en la Kristnaska tempo 1905.

Fr. Schneeberger.